

MIRMEKOBO 19



JUNIO 2012

MIRMEKOBO 19

junio 2012

Redaktoro: Donald Broadribb

La URL de la retejo de Mirmekobo estas: <http://mirmekobo.com>

Sur paĝo 1: La indiĝena saltetanta muso (Notomys alexis) ekzistas unike en Aŭstralio (aliaj subspecioj de la familio Muridae troviĝas sur aliaj kontinentoj).

TABELO DE ENHAVO

Rakonto	La ĉefo faŝista de mia filo (de Naun Kule)	3
Poezio	de Petro Palivoda	7
Geografio	Mapoj de Aŭstralio tra la jarcentoj (de Donald Broadribb)	10
Eseo	La troja milito kaj la albana morkodo (de Ismail Kadare)	18
Korekto		23
Klarigo	Kazuaro ≠ Dromiceo	23
Humuro	(anonima)	25
Zoologio	Foto: Indiĝena aŭstralia platdorsa kelonio.....	25
Rakonteto	La lakto (de Herta Müller).....	26
Foto	Spongoĝardeno en la marparko Jurien Bay, Okcidenta Aŭstralio.....	27

ĜENERALA INFORMO

Mirmekobo estas per-interreta A5-formata eldonaĵo senpage abonebla, ankaŭ individuaj numeroj estas senpage haveblaj. Ĉiu persono rajtas kontribui al la enhavo de *Mirmekobo*. Neniu surpapera formo de *Mirmekobo* ekzistas. La kialo estas ke la presado kaj dissendado de surpapera ekzemplero estus tre multekosta, tiel ke abono estus ankaŭ tre multekosta. Tamen, se vi mem deziras presi per via komputilopresilo por vi aŭ por alia(j) persono(j) ekzemplero(j)n de *Mirmekobo*, tion vi rajtas libere fari. Ankaŭ la perretan formon vi rajtas libere dissendi.

La redaktoron vi povas kontakti ĉe donbroadribb@mirmekobo.com

Rakonto

La ĉefo faŝista de mia filo

de Naun Kule (Albanio) tr. Bardhyl Selimi

Iun majan noktomezon, antaŭ dek jaroj, mi unuafoje eltrajniĝis en la Centrala Stacidomo de Milano. La trajno venis de Torino, kien mi alvojaĝis per aviadilo Tirano-Romo-Torino.

Surprizite de mia neatendita alveno, la voĉo de mia filo Genti ŝajnis al mi iom trema:

“Paĉjo, atendu surloke...! Staru en la lumo. Mi estas alvenonta!”

La plenlumo ĉirkaŭa kaj la brua moviĝado de la homoj, veturiloj kaj motorcikloj, surtere kaj en la metroo de Milano, iel ŝokas ĵusalveninton, kiu hastas eniri en tiun senfinan homamason tiom moveman, brueman kiel tondro kaj ĥaosan.

Mia filo Genti pasigas la kvinan jaron en ĉi tiu urbo. Ekde du jaroj li deĵoras en granda restoracio kun du aliaj albanoj, du ĉinoj, unu ruso kaj tri italoj el la sudo. Estis tie ankaŭ Daniele, la sola filo de la restoraciĉefo, altstatura kaj dika, bone nutrita kaj prizorgita. Li estos la certa morgaŭa posedanto de ĉi tiu restoracio en la centro de Milano. La granda ĉefo, Ĝanluka, ne permesas al sia filo estri la restoracion. Kontraŭe, Daniele estas sub la direktado de albano. Ĉu tio estis truko de la ĉefo, aŭ lia metodo por eduki sian filon...!?

“La posedonton apenaŭ naskas la posedanto, sed nur lia laboro!” diris la ĉefo. “Kiam mi estis duone aĝa kiel Daniele, mi barakte kuradis post la amikoj de mia patro por enspezi iom da mono.” La restoracion la patro ekposedis nur post 40 jaroj da laboro.

La ĉefo, sidante ĉe la tablokapo, elektis la trinkaĵojn. La albanoj sin sentis pli ĝojaj. Dankal pro mia bonveno, la ĉefo honoris ankaŭ ilin. Sidiginte nin apud si, li petis ke Genti servu al la kamaradoj..

“Ĉi vespere li ĝuigu sian patron!” diris la ĉefo, ridetante.

Ni trinkis vinon, babilante kaj salutante unu la alian ĝis la tagiĝo. Li invitis nin ankaŭ al morgaŭa vespermangŝo.

Ĝanluka mem pasigis preskaŭ sian tutan tempon ĉe la dusidloka tablo ĉe la angulo. Sidiĝis kaj leviĝis mem, kiam ajn li konstatis ke la knaboj ne sukcesas plenumi iun taskon. El tiu loko li observis ĉiun detalon, movon, eĉ la gestmanieron de la kelnero dum tiu aliris klienton, bonvenigis lin kaj ofertis la menuon.

“Tiu laboro estas pli homa interrilato ol aferismo, menuo aŭ kuirado!” diris la ĉefo alvokinte unu kelneron. “La fakturon de la tablo n-ro 8 alportu al mi. Salutu la homojn tie kaj diru ke la tuta mangŝo estas jam pagita!”

Tiun agon li ripetis ankaŭ poste por alia tablo.

Demandite de mi, li subridis: “La oleo surverŝiĝas brasikon? La aferismo antaŭvidas kaj profiton kaj malprofiton, ĉu ne? Mia patro konsilis al mi ke se oni ne donas, oni ne ricevas. Tutan vivon mia patro...”

“Jen, rigardu ĉi tiun foton. Ni estas en Puglio, en malgranda vilaĝa restoracio. Sed plenplena. Pli bone malgranda kaj plenplena ol granda kaj malplena, ĉu ne? Vidu, la patro mem servas. Kiam alvenis amikoj aŭ honorindaj homoj, li mem servis, kvankam li aĝis pli ol 60 jarojn. Vidu min 12-jara. Sed ĉiutage en la laboro. Dum longaj jaroj mi konis nur tri lokojn: lernejo, laborejo, dormejo!

“La plej videbla murflanko estas plenplena de fotoj, malnovaj, nigra-blankaj, malgrandaj kaj grandaj, kiuj eĥas la infanaĝon de la ĉefo, la devenon, la praavojn kaj gepatrojn.

“Jen la domo kie ni naskiĝis; el tie ni ekvojaĝis. Tiu estis la restoracio...kiu estigis ankaŭ la hodiaŭan.”

Mi promenis miajn okulojn tra la tuta spaco de la restoracio kaj koncentriĝas sur la agrabla vizaĝo de la ĉefo. Ĝanluka parolas ankaŭ pri tradicio kaj kulturo, pri historiaĵoj prilumigantaj eventojn kaj naciajn figurojn, heroojn kiujn li plie amis kaj sendepende donis siajn aprecojn.

Jen, tie la patro estis en la faŝistaj vicoj. Jen la breviero, uniformo. “Nu, ankaŭ por ni estis iam tempo... Sed... Oni grave eraris. Oni forlasis Musolinin, lin perfidis eĉ Hitler mem”.

Mi kaptis lian demando-observon kaj klopodis ŝanĝi la temon. Sed mia filo ne lasis min: “Paĉjo, la ĉefo havas faŝistajn opiniojn. Sed vi ne respondaĉu, nek nervoziĝu. Rigardu la ĉemizon, aŭ nigran aŭ brunan. Se vi eniros tiujn historiaĵojn, nur aŭskultadu!”

Ĝanluka replenis la glasojn per blanka vino, mendis alian fiŝon kaj subridis. Li eble divenis kion diras mia filo, sed mirinde reagis tre prudente, dezirante plidaŭrigi nian babiladon.

Genti informis min ke vi iam estis komunisto, ĉu ne?” aldonis li, iel explore sin turnante al mi.

“Mi fakte ne studis historion, nek politikon, sed mi ja legis librojn pri la eventoj okazintaj: kial ili okazis, kiu okazigis ilin. Ĉe mi ekzistis ĉiam deziro scii pri ili. Ĉar se oni ne scias kio okazis envere... Jen Italio, ĝi ne produktis ankoraŭ duan Musolinon. Eĉ neniam tio okazos. Tiaj ŝtatestroj kiaj li aperas po unu en jarcento...”

Nun mi vere embarasiĝis. Eĉ grave provokiĝis je miaj naciaj konvinkoj. Sed la ĉefo kondukis siajn pensojn tiom amike ke neniue povus miskompreni lin.”

Tamen se li troviĝus aliloke, en la rondo de miaj kolegoj, mi antaŭvidus grandan skandalon.

Trinkante la duan vinglason, mi rerigardis lin fikse kvazaŭ mi pripensadus tempoprosperante por formuli respondojn. Sed Ĝanluka stariĝis. Pardonpetis kaj marŝis direkte al la tablo de kie stariĝis la lastaj klientoj. Li kolektis la pladojn, kunportis ilin al la lavejo, ŝanĝis la tablotukon, lavis la manojn kaj revenis al ni.

“Tasko de kelneroj!” diris mi ridetante. Fakte mi intencis inciti lin, ja kia ĉefo purigas platojn kaj tablojn?

“La knaboj estas okupataj,” respondis li ĉirkaŭrigardante. “Ili bone laboras, sed nuntempe la laboro pliĝas. Mi jam diris al ili ke la restoracio enspezigas monon por ĉiuj ni. Ankaŭ por Tirano, Pekino, Moskvo, Napolo, Bari. Kompreneble ankaŭ por mi. Se ni pliigas la laboron, ni enspezas pli, ĉu ne? Mi ĝojas kiam Genti sendas monon al Tirano. Ĉar tio estas ia respondeco. Ankaŭ deziro, laboremo kaj edukiteco. Alie vi estas neniu, vi estas soleca. Jen Ĝusepe, tri jarojn, dum li estas ĉi tie, ne vizitis Napolon kie loĝas liaj gepatroj. Vi alvenas el Tirano. Ĝusepe ne konas ĝin. Tie, kien irus lia menso, forto, mono? Nepre al inoj, drogoj, diboĉoj! Sed albanoj surprenas multajn devojn. Ili sentas siajn familiojn surdorse ne grave kiom ajn foren ili iras.”

Ĉio dirita de li estis bona kaj certe plaĉis al mi. Sed miajn okulojn trafis la nigra ĉemizo de la ĉefo kaj miajn orelojn bruligis kion li diris pri Musolini. Kaj kvazaŭ por reiri laŭ la dezirata pado, mi diris:

“Mussolini, Hitler, Stalin, Enver, ĉiuj estas diktatoroj, tutsame. Ĉu ne?”

Kaj mi ekspektis ke Ĝanluka eksplodos ĉar mi miksis lian idolon kun la ceteraj monstroj de la mondo. Li silentis dum li trinkis la glason da vino. Rigardis min suspekteme, subridis kvazaŭ li sentas ke mi ĉirkaŭfermas lin, kaj levis la okulojn.

“Mi ne scias..Mi ne kredas ke ili estas tutegalaj, aŭ kontraŭuloj, ankaŭ tutsamaj! La kontraŭuloj intermilitas unu la alian por turni aliajn al si, ĉu ne?”

“Teorie jes, sed la imperioj de Hitler kaj Duce, de Stalin aŭ Mao, same kiel tiuj de Cezaro, Napoleono kaj sultanoj en iamam tempoj, estis similaj: imperioj. La amaso laŭdis ilin ĝis tiu grado ke ili faris la popolojn kanonviando, por venkinte, senhavigi.”

“Tiel ja agis ankaŭ komunistoj, komunistaj diktatoroj!” konfirmis la ĉefo.

“Tiel agis ĉiuj diktatoroj. Kaj ĉu vi scias kial? Ĉar ili havas saman radikon; kunigas ilin la esktrismo aŭ ekstrema naciismo. La esktrismo estas egale danĝera, ĉu maldekstrema, ĉu dekstrema; faŝisma, komunisma, naci-socialisma, ktp. Ĉiuj ili gravediĝas kaj naskas diktaturojn. Kaj ĉiu diktaturo supreniras al la ŝtatpotenco piedpremante la kadavrojn.”

“Tamen, mi diras ke komunistoj estis pli esktristaj, eĉ malhumanaj.”

“Mi ne kredas. Almenaŭ la historio...”

“Jen...la historio. Vi scias do ke oni mortigis Musolinin ĉi tie, en ĉirkaŭaĵoj de Milano. Mi ankoraŭ vizitas tie. Vi scias ke oni pendigis lin. Sed kiam? Post

kiam oni mortigis lin. Rigardu, diru al mi, kial oni devas pendigi kadavron? Neniu la militleĝo akceptas tion. Jen tio estas malhumana. Kaj mi kredas ke vi scias ke tion ja faris komunistoj.”

“Ne, mi ne scias ĉu tion ja faris komunistoj. Sed la komparo kaj la fakto ĉiam ĝeneraligas. Mussolini estis aparta kazo en la teruro kaj pesto de la tuta milito, de la monda hombuĉado.

“Miloj da junuloj mortigis ne sciante la kialon kaj la mortiginton. Miliono da homoj naskiĝis kun la angoro kaj teruro de la morto. Kaj tiu malfeliĉaĵo kaj katastrofo portis nur unu nomon: Duce, ĉu ne? Por malŝarĝi kaj savi la homojn de kelkaj nacioj de ĉi tiu terurego kaj angoro, ne sufiĉus la vorto ‘estis kaptita’ aŭ ‘estis mortigita’. La homoj traŭmatizitaj kaj ŝokitaj pro tiu nomo, ne plu kredis al la paroloj. Ili devus vidi propraokule, eĉ kelkfoje. Nur tiel ili povus konvinkiĝi ke la malbono jam pasis.”

La ĉefo tintigis la glason kun mia, eltrinkis ĝin silente kaj ekokupis sin pri la fiŝodorso surplada. Li sentis ke la konversacio iel profundigis kaj se oni daŭre kondukus ĝin tiamaniere, ne sufiĉus la tuta vespermanĝo. Aŭ li ja komprenis ke niaj tranĉeoj troviĝis sufiĉe for unu de la alia. Tamen ne estiĝis iu ajn malplezuraĵo, nek iu ajn nervozeco. Dume li signalis al kelnero ke li alportu fruktojn.

Mi esploris ĉu mi kolerigis lin, tial ridetante mi aldonis: “Estu kiel ajn, la homoj havas siajn opiniojn. Tial ni ĝojas pro la multkolorco de la vivo. La homo agas laŭvole kaj laŭ propra juĝo.”

“Certe, laŭvole sed ankaŭ laŭscie” diris Ĝanluka, ĉiam trankvila kaj plenrida, maksimume ĝentila. Tiel, naturece, li transtemis la konversacion al la aferismo kaj la domo kiun li posedas en la montaro, kie la familio ripozas dum semajnofinoj.

Poste ni babilis longe pri Albanio kaj albanoj. Li estis kreskinta ĉe la marbordo de Puglio kaj diradis al la knaboj tie ke ni ĉiuj estis naĝintaj en la sama maro, sed vi ĉe la transa bordo, ni ĉe tiu ĉi.

Kaj levante la glason li aldonis ripensinte:

“Jen, tiom proksime kaj tiom malproksime estas niaj bordoj! Ĉu ne? Fakte la bordoj plu kuŝas tie, sed niaj antaŭuloj kaj regantoj proksimigis jen malproksmigis ilin, laŭ tio ĉu ili kverelis aŭ ne inter si. Nuntempe oni proksimigas la bordojn, ĉu ne? Jen ni ĉi tie kune, knaboj, iliaj kamaradoj. Ĝojon al vi!”

Kaj ni eltrinkis la vinglasojn.

Tirano 1998-2008

Poezio

de Petro Palivoda (Ukrainio)

Leontodo

nenio okazis en mondo
pereis nur leontodo
traktoro per radoj multpezaj
ĝin premis al tero senbate
mi vidis paraŝuteton
ĝi longe ne falis surteren

Printempo

riveroj enfluas maron
por iĝi la oceano
printempo
degelas glacio
kaj kien vi estos fluonta
fonteto de mia animo

forĵeti balaston gravan
sin bani en la ĉielo
brulvundi multfoje manojn
tuŝante varmegajn stelojn

kaj esti ĉiam
kun vi apude

maleblas ploro
kiam pluvas
kunfluas larmoj viaj
kun la nubaj
kaj post pluvego
ĉu ĉielarko
ĉu rideto

Petrografio

roko
sin detirante
ĝemas
kaj falas malsupren
maro da ĝiaj pecetoj
similas al fajroartaĵo
ŝtono sin rulas malsupren

Ekvilibro

nek sur la tero
nek en la ĉielo
limigita surfaco estas
per rektlinio
sin levi en la ĉielon
gravito baras
por ne fali sur la teron
ekvilibro necesas

Pendolo

Tien – ĉi tien,
tien – ĉi tien.
Mi haltos –
kaj tempo haltos.
De mi dependas
ĉu morgaŭo estos.
En knar' de ĉeno mia
hieraŭo estis.
Trankvilo mia
morto estas.

Aŭtune en malsanulejo

ĉio blankadas
muroj
plafono
litoj
kiteloj
kaj neĝo ekstere
ĝi baldaŭ ekfalos

Feliĉo

estas malvarme
varme
varmege
varme
kaj ree malvarme
serĉante feliĉon
mi malvarmumis

en tiu ĉi urbo
vi jam ne estas
surstrate veturas
malplenaj tramoj
malfermitajn fenestrojn
eniras vento
kiel fantomo
vagadas pasinto

iam en la ĉielo
mi vidis belegan arkon
kaj ne povis deŝiri rigardon
mi tiel volas ĝin ree ekvidi

iam en verda arbaro
mi aŭskultis miraklan birdon
kaj sonis magia muziko
mi tiel volas ĝin ree ekaŭdi

iam mi vidis vin
kaj aŭskultis

Geografio

Mapoj de Aŭstralio tra la jarcentoj de Donald Broadribb (Aŭstralio)

Jam dum antikvaj epokoj oni argumentis ke devas ekzisti sudhemisfera lando por ekvilibrigi la teron. En la mezepoko kiam oni komencis fari mapojn de ronda tero, oni do per-image desegnis tian landon. Ekzemple:



1530 — 1585 mapo far Thomas Porcacchi

Rimarku ke la regiono sude de Sudameriko estas konjekta (kaj la Amerikoj grave misdesegnitaj).



1592 mapo far Abraham Ortelius montras Novgvineon kiel apartan insulon, sed Sudameriko etendiĝas ĝis la supro de konjektata suda kontinento. [Mapo en la Australian National Library]

Tamen se oni ekzamenas la insulon Novgvineo en la mapo far Ortelius, oni rimarkas ke grandparte tiu desegnaĵo estis nur konjekta:



Mapo far Ortelius



Foto far NASA

Dumlonge oni akceptis varianton de la mapo de Ortelius, ekzemple:




1595 far Michel Mercator: "America sive India Nova" (Nat.lib.Aus.)

Kiam fine oni trovis la sudan kontinenton Aŭstralio, oni supozis ke Novgvineo estas ligita al Aŭstralio:



1667 far Peter Goos (Nat.Lib.Aus)

Multrilate la unuaj mapoj de Aŭstralio estis iom strangaj:



Aŭstralio troviĝas oriente de Ĉinio...

1666 far Pieter Goos (Nat.Lib.Aus.)

Jen Aŭstralio (Hollandia Nova) iom oriente de Ĉinio, kaj kun iom stranga formo.

Poste Pieter Goos redeseĝnis Aŭstralion:



1690 far Pieter Goos (Nat.Lib.Aus)



1697 far Vincenzo Coronelli (Nat.Lib.Aus.)


La ĉisupra mapo montras pli-malpli similan okcidentan aŭstralian bordon, sed la cetero de la kontinento estas ne montrita. Tamen, en la sudo aperas la suda parto de Tasmanio, kaj (verŝajne) parto de Novzelando.



1739 far Guillaume de L'Isle

Nun Novgvineo ne plu estas parto de la aŭstralia kontinento, kaj Novzelando, kun du ĉefinsuloj, nun videblas.


Oni ankoraŭ ne sciis ke Tasmanio (tiam nomata Tero de Diemen) estas insulo. Inter 1772 kaj 1788 nur la sudorienta parto de Tasmanio estis vizitita, kaj oni supozis ĝin parto de la sudorienta aŭstralia kontinento. Mapistoj helpeme imagis kaj desegnis aŭstraliajn bordojn por indiki tion.



1756 Robert de Vaugondy [Nat.Lib.Aus]

Kvankam kelkaj esploristoj jam konjektis ke Tasmanio efektive estas insulo aparta de la aŭstralia kontinento, tion unue pruvis en 1798-1799 Matthew Flinders kaj George Bass. Ili la unuaj ĉirkaŭveturis la tutan insulon, kaj tiel trovis la markolon kiu apartigas la insulon disde la kontinento. Tiu markolo estis nomita Markolo Bass, honore al la velisto George Bass.

Matthew Flinders en 1802 publikigis la unuan mapon sur kiu videblas la markolo kaj Tasmanio kiel insulo:



National Library of Australia

nla.map-rm2935-v

Ĉ. 1802 mapo far Matthew Flinders montras la tutan insulon Tasmanio kaj la markolon inter ĝi kaj la kontinento. [Nat.Lib.Aus.] La titolo de la mapo diras “Carte de Détroit de Basse de la Terro de Diemen” = “Mapo de Markolo de Bass de la Tero de Diemen”.



1850 (Nat.Lib.Aus)

Desegnaĵoj pri la loĝantoj de okcidenta Aŭstralio en 1856 montras tre imagoplenan bildon de la homoj tie:



1856 far Nicholas Vallard

Aŭstralio komencis okupi Britio jam en 1788, per sia sendo de ŝipoj da enkarcerigoj al punloko ĉe la orienta bordo de la kontinento, kune kun administrantoj, karceristoj, ktp. Dum 1788-1868 pli ol 165,000 homoj estis tiel deportitaj por punado. Ekde 1801 punatoj kiuj plenumis la oficialan daŭron de sia puniĝo liberiĝis, kaj plejparte restis en Aŭstralio kiel liberuloj. En 1868

Britio oficiale abolis la punsendadon al Aŭstralio.

Liberaj migrantoj al Aŭstralio ankaŭ abundis dum kaj post tiu periodo.

— — —



Aŭstralio (NASA)

Eseo

La troja milito kaj la albana morkodo

de **Ismail Kadare** (fragmento el la verko *Eŝhilo — tiu granda perdinto*)

tr. Bardhyl Selimi (Albanio)

Parto 1

Delonge estas agnoskite kiel nediskutebla fakto, ke la malnova greka beletro scipovis profiti el la flankaj artismaj fokusoĵoj kiuj viglis ĉirkaŭ la regiono de Grekio, ekde la mitoj asiro-babilonaj, egiptaj, la prapatraj poemoj, kiel “Gilgameŝo”, kaj nature, ankoraŭ pli, el fontoj fluantaj ĉe ĝiaj naturaj limoj, ĝiaj balkanaj najbaroj. Tiuj fontoj, malavare, tagnokte, ekspedis al la artisma metropolo greka partetojn de la spiritaj trezoraĵoj aldonante al la kolosa trezoro de grekoj. Tutaj mitoj aŭ ties partoj, partetoj de poemoj, buŝaj, artismaj bildoj plej mirindaj, nomoj de la ĉielaj kaj inferaj diinoj, strebis malrapide al la greka universo, pliigante, modifante aŭ ĝemeligante ties stelarojn.

Tamen, kvankam estas akceptita preskaŭ unuanime tia fazo, direndas ke en la senfina kvanto da studoj pri la antikva greka beletro ankoraŭ mankas tiuj studoj kaj esploroj kiuj ligu tiun beletron, ĝiajn radikojn kaj mesaĝojn, kun la historio, pensado kaj komuna substrato de la popoloj de Balkanio, pli proksimaj najbaroj, pli antikvaj ol la malnovaj grekoj.

Kelkaj faktoroj kontribuis por tia konceptiĝo, iel disdividita forde sia grundo, de la plej brila spirita trezoro de nia malnova kontinento.

Inter la ĉefaj faktoroj estis sendube la fakto ke la antikva greka beletro transpasis al la eŭropeca heredaĵo tra la latin-romia ponto. Estis ja romianoj tiuj, kiuj entuzismiĝinte pro ĝi, lasinte sin okupiĝi per ĝi (kio sendube estis ilia merito), publicis, republicis, tradukis kaj komentis ĝin vaste. Do, tiel, akompanate, unuavice, de romiaj komentoj, ĝi akiris mondan rekonuon.

Ĝuste tie okazis ankaŭ la unua atenco al tiu beletro. Sendepende de la romia lojaleco al la greka arto, oni neniumomente forgesu ke romianoj estis okupantoj, inter la plej kruelaj kaj sistememaj jam konataj de la homa historio. Kiel tiaj, ili apenaŭ povis kompreni tiujn profundajn putojn el kiuj ascendis la ordonoj kaj signaloj de popolo, kaj kiuj decidas kaj programigas ties arton. Des malpli povis la romianoj kompreni la reciprokajn influojn de la balkanaj popoloj unu al la alia kaj aparte la interŝanĝon de iliaj spiritaj trezoraĵoj. Pro la ignoro kaj orgojlo de la okupantoj, per fero kaj sango subigintaj la tutan balkanan regionon, ili apenaŭ povis akcepti ke ankaŭ aliaj popoloj havis tiajn meritojn kiujn ili devis agnoski pri la grekoj.

Des pli ke temas ĉefe pri obstinaj ilirianoj, kiuj pli ol iu ajn ĝenis la

“nerompeblan” Romo.

Krom tio, oni ne devas forgesi ke romianoj estis proklamintaj sin rektaj posteuloj de la greka kulturo kaj denove la orgojlo kaj la aroganto de la okupantoj apenaŭ povus proksimigi al ili la ideon dividi tiun monopolon kun iu alia.

Bedaŭrinde, la komentoj, esplorstudoj kaj latinaj tezoj pri la antikva greka beleto akiris ian oficialecon en la eŭropa mondo. Ili restis tiaj ankaŭ post la disfalo de Romio kaj multaj el ili daŭre vivas ankoraŭ hodiaŭ, sendepende de iu sofisma formuligo.

Unuflanke la progreso de la eŭropecaj landoj kaj aliflanke la postrestado, de la balkanaj landoj, subpremataj de sinsekvaj obskuraj jugoj, pligrandigis ankoraŭ pli la ignoradon de metropoloj al la grundo iam naskinta mirindajn ĉefverkojn. La romian malŝaton anstataŭis la komuna indiferento de la grandaj okcidenteŭropaj nacioj, kiuj malgraŭ la alvokoj de Byron aŭ Shelley, Goethe aŭ Holderlin, tre baldaŭ forgesis al kiu ili danku siajn kulturajn radikojn.

Pro malatentemo al la sorto de la balkanaj popoloj, kompreneblas kial oni konsideris la beletron kaj grekan arton aparta de la historiaj kaj sociaj cirkonstancoj, de la identeco de greka popolo mem (estis sciencistoj kiuj klopodis pruvi ke la hodiaŭaj grekoj neniel rilatas al la malnovaj grekoj). Por tiuj ĉi, la antikva greka beleto estis universala trezoro kaj, laŭ iliaj konceptoj, la universalaj trezoroj ne apartenas al etno.

Ankaŭ se ofte ili ne aŭdacis esprimi tian ideon malkaŝe, la tuta strukturo de iliaj ideoj, la akirado de beleto ekster la tempo, de historio, de konkretaj dramoj, kondukas nepre al tiu ideo.

La tragika postresto de la balkanaj popoloj neeviteble kaŭzis apenaŭ notindan partoprenon de sciencistoj kaj iliaj malmultaj filozofoj en la disputo universala pri antikveco. La indiĝenaj “dommastroj” longe restis marĝenaj. Sed en la deknaŭa jarcento, post la sendependiĝo de Grekio kaj, poste, dum la impeta tempo de aliaj popoloj de duoninsulo kaj de la liberiĝo de tuta Balkanio el la otomana jugo, la voĉo de enlandanoj aŭdiĝis pli kaj pli, ĝis malfrue ĝi influis ankaŭ la fremdajn sciencistojn. Plej profundaj kaj plej seriozaj el tiuj komprenis ke sen tiu voĉo mankus multo direbla pri la beleto kaj antikva arto.

Ili, konsciaj ke kiam temas pri la komuna kultura balkana substrato, albanoj kiel unu el la plej aŭtoktonaj popoloj de la duoninsulo, havas la saman rajton je parolo aŭdinda, ili skribis kaj parolis pli ol unufoje pri la multaj fadenoj ligantaj la grekan arton de la parolo kun la komuna historio de balkanaj popoloj, kun ties arto, kaj aparte kun la riĉa buŝverkado de la praa albanaj poezio kaj prozo.

Post ili, distingitaj sciencistoj kaj esploristoj el aliaj landoj ne nur agnoskis tion senduba, sed donis notindan stimolon por esploroj kaj pluaj traserĉoj. Io estis farita, tamen ankoraŭ malmulta kaj hazarda. Tiel, ekzemple, en iu sia libro

de la jaro 1986, J.P. Vernant kaj P. Vidal Naquet reproduktas traduke en la francan sub la titolo “Rumana Edipo” malnovan rumanan baladon, kolektitan kaj eldonitan en 1967 en Bukareŝto de la rumanoj mem. La analogio kiun la francaj mitologoj trovis inter la greka mito kaj la rumana balado estas tute evidenta kaj estas envere bedaŭrinde ke tiaj komparaj studoj estas ankoraŭ tre raraj.

Ekzistas ja dekoj da kanzonoj kaj malnovaj baladoj ĉe ĉiuj popoloj de la Balkana Duoninsulo, kie estas troveblaj ie pli klare kaj aliloke pli pale *eĥoj de la mito pri Edipo*, samkiel de la aliaj mitoj antikvaj. Ili estas trovitaj aparte ofte en la kanzonoj de militserva kaj ekonomia elmigrado.

La militista kaj ekonomia elmigradoj estis ja du el la plej doloraj dramoj por la balkana homo. La militservo, kiu en pluraj landoj estis io pli-malpli ordinara, ĉi tie ricevis inferajn skalon kaj dimensionojn. La fakto mem ke en la kondiĉoj de la kolosa imperio, kia estis la turka imperio, kie la servo realiĝis en regionoj tre foraj kiel en la dezerto de Jemeno aŭ de Suda Arabio, sufiĉis por doni al ĝi la naturon de tragedio. Parto de la militvarbitoj ne plu revenis hejmen, aliaj revenis tute ŝanĝitaj pro longdaŭro de la servo aŭ la suno de dezerto.

En la baladoj plej triste estas prezentita la malreveno aŭ reveno (kiu ne diferencis ĉe tiuj militvarbitoj).

La ekonomia elmigrado, komenciĝinta tuj post la liberiĝo de Balkanio el la turka jugo (kvazaŭ ne plu lasante la popolojn de Balkanio sen malfeliĉo), havis la samajn spacajn dimensionojn kiel la militserva, nur ke nun la arabaj dezertoj anstataŭiĝis per Usono, Aŭstralio k.a. Samtiel en la unua kazo, ankaŭ nun parto de fuĝintoj ne plu revenis aŭ, reveninte, ne plu rekonigiĝis.

Por kanti pri tiuj du kolosaj afliktoj, la balkanaj popoloj elfosis, verŝajne en sia komuna artisma memoro, kaj el ĝiaj putoj reelĉerpis en la lumon la malnovajn modelojn, tiun artisman mekanismon kiu kreis siatempe la “kanzonojn de foresto kaj reveno”. La ombroj de Odiseo, Agamemnono, Edipo estis ĉiuj tie, malantaŭ la militekipaĵoj de la varbitoj aŭ la valizo de elmigrinto atendanta angore la surteriĝon en Usonon. Nek la vivo de la kazerno en la dezerto, nek la lumoj de Manhattan aŭ de Brooklyn, povis forviŝi el ilia konscio la praaajn artismajn miksaĵojn.

Tial kiam alvenis la momento por prikanti la novajn dramojn de “foresto kaj reveno” ili rifuzis la bildojn kiujn proponis al ili la araba dezerto aŭ la usona realeco, kaj ili sin turnis al la arketipoj, en kiuj estis knedita iam la kombino de arkaikaj poemoj kaj de tragika teatro. Tiel, ne kontentaj pri baladoj kie oni prikantis la enuon de la soldato, la vivon de la kazerno, la ekonomian mizeron de la familio atendanta lin, la morton minacantan la soldaton dum la militservo kc. kc., la popola muzo serĉis dimensionojn pli universalajn por tiu

dramo.

La motivo de geedziĝo ekster la gento, la eblo de incesto inter frato kaj la fratino, tiun motivon kiun Eŝhilo traktis en sia *Petegantinoj*, kaj en la praa mezepoko ĉiuj popoloj de Balkanio prikantis en la balado de la Mortinta Frato, la popola muzo adaptis ĝin al la moderna angoro de la militservo. En multaj baladoj oni prikantas la eblon de incesto inter la frato-soldato, kiun revenintan post longa tempo, ne konas plu ankaŭ ne lia fratino, kun kiu oni volas lin geedzigi. Kaj sub la vestoj de ekonomia elmigrinto revenanta finfine el Usono aŭ Australio, aperas neatendite Edipo.

Sed la dramo de Edipo disvolviĝas en kontraŭaj direktoj. Ne estas la filo, sed la patro elmigrinta longtempe kaj sekve, ne estas la filo kiu mortigas la patron, sed la patro kiu ne rekonas hejmen revenintan sian filon kaj mortigas lin kiel “amanton” de sia edzino - lia patrino.

En la kazo de la incesto frato-fratino, en la popolaj balkanaj baladoj agas la mekanismo de tio, kion oni povas nomi “la ĉeso de la malbona sonĝo je la lasta momento” (ĉiam oni trovas kaŭzon, memoraĵon, signon por preventi la inceston). Dum ĉe “reveno de filmurdanta elmigrinto” agas la dramo de miskompreno. Pro tio kelkaj esploristoj konsideras iliajn finojn “optimismaj”, metante en tiun epiteton leĝeran neglektan subtekston. Mi opinias ke la finoj, “optimismaj” aŭ ne, ne ŝanĝas ion en la valoro de tiuj kanzonoj kaj ke la sinteno de la popola muzo ĉikaze tute bone similas al la paroloj de Sofoklo:

Sed ne timu la kroniĝon kun la patrino

Ĉar multaj homoj jam vidis sin, en sonĝo,

Dormanta kun la patrino sia.

Nature, rilate la komparon de mitoj, poemoj kaj antikvaj tragedioj kun iliaj postaj eĥoj en la buŝverka balkana poezio estas multe malkovrenda. Aparte traesplorenda estas la buŝverkado de albanoj, kiu estante unu el la plej malnovaj en la duoninsulo, estas pli ŝargita je malnovaj mitologiaj memoraĵoj.

Rilate tion, direndas ke tia poezia kapablo ne estas hazarda. Albanoj, kiel eternaj najbaroj de grekoj dum ĉiuj tempoj, kvankam ili posedis lingvon tute malsimilan al la greka, havis, kontraŭe, sufiĉe multe da simileco en la aliaj sferoj.

Lastatempe. J. Lacarrière, skribante pri la vizaĝo de la sendependa Grekio, diras: “Tiu vizaĝo ne estas ĉiam tuj sentebla, ĉar kiel ni vidis jam, tiu sendependa Grekio estas ankoraŭ maskita sub la influoj turkaj, albanaj, kaj pli poste bavaraj. Tio estas sendube unu el la apartaj karakterizaĵoj de tiu nova ŝtato; naskiĝi kaj kreski pro diversaj maskoj, heredigitaj de okupantoj aŭ siaj “protektantoj”.

Ne kontraŭstarante al tio dirita de J. Lacarrière, rilate la fremdajn maskojn sur la vizaĝoj de Grekio, ni povas fari, tamen, la demandon: se la turka masko

estis tiu de la ŝtatpotenco kaj la germana masko tiu de la “protektanto”, kion diri pri la albana masko? Estas sciata ke Albanio estis kaj povus esti nek okupanto, nek protektanto de Grekio. Do kio tiris ties maskon sur la vizaĝon de alilando?

La respondo estas simpla: estante nek okupanto, nek protektanto de grekoj, albanoj estis simple iliaj najbaroj, eternaj kaj neŝanĝeblaj najbaroj ekde mitologiaj tempoj ĝis nuntempo. Tiu kapablo estas, do, trajto de najbareco, kaj ne gravas je kia ajn formuliĝo ĝi esprimiĝas (masko, sublito, surlito, k.a.) oni povas atesti pri ĝi tutegale komencante de nuntempo por descendi profunden en la jarcentojn, aŭ ascendante de tie al nia tempo.

Por ekiri de profundoj, ne signifas nur spikumi nomojn de nimfoj aŭ diinoj, pri la graciaj de Circo, de Erinioj, de Ciklopo, de Oresto, k.a., aperantaj fojfoje en la praa albana eposo, nek pri la eksplikoj de nomoj aŭ fenomenoj kiujn oni povas dismunti nur helpe de la albana lingvo, do oni ne parolas nur pri tiaj eltrovaĵoj, nek pri la eĥo kiun ili postlasis en la verko de tragediisto, la komunaj historiaj sortoj de la balkanaj landoj, sed pri la strukturoj pli profundaj kaj arkaikaj, kiuj reatestas potence pri la ekzisto de iu substrato: la iliria-albana-greka kulto.

La trilogio “Orestio”, la plej kompleta kaj bela verko de la antikva tragedio, estas eble la plej konvinka atesto pri tio.

Sangovenĝo, kiel naskaĵo de la parencara ordo, estas konata fenomeno en multaj popoloj kaj en multaj punktoj de la terglobo, eĉ tre foraj unu de la alia. Sed, diference de multaj aliaj popoloj, la sangovenĝo ĉe parto de balkanianoj, ĉefe ĉe albanoj, estas parto de tiu konstitucia mekanismo kiu bordis tutan ilian juran, moralan, filozofian vivon. En la fundamenta mora kodo de albanoj la sangovenĝaj juĝoj okupas notindan lokon. La interpretistoj de la kodo estis la ununuraj juristoj akceptataj de kvereluloj, kiuj forjetis ĉiam kiel ion fremdecan kiun ajn pli postan juron, eĉ romian, bizancan aŭ turkan.

Aliflanke, substrekante ke la murdoj pro sangovenĝo, samkiel la juĝoj pri ili servis kiel motivo por vico de beletraj verkaĵoj, estas dirende ke *“Orestio” estas la sola antikva verko kaj rara en la tuta monda literaturo, en kiu la motivo de sangovenĝo kaj de ties juĝado disvolviĝas en tiu konflikto laŭ la mora kodo de albanoj.*

(daŭrigota en Mirmekobo 20)

Korekto

En *Mirmekobo* 17, paĝo 9, legu Carnaby, ne Carnegie.

Klarigo

kazuaro≠dromiceo
de Donald Broadribb

Kelkaj legantoj de *Mirmekobo* 18 rimarkis en mia rakonto “Irenjo, la mistero de la ‘ŝtelita’ globkrajono” menciojn pri la aŭstralia birdo *dromiceo*. Ili supozis ke temas pri la birdo *kazuaro*, kiu ja ekzistas ankaŭ sed ne sole en Aŭstralio.

Temas pri du birdospecioj el du apartaj sed similaj familioj. La kazuaro, el la familio *Casuariidae*, ekzistas ankaŭ ekster Aŭstralio, i.a. en Novgvineo kaj aliaj insuloj:



Kazuaro

Ĝi altas kutime 1,5-1,8 metrojn. Nur unu kazuara specio troviĝas en Aŭstralio. Same kiel ĉe la dromiceoj, la patroj kovas la ovojn kaj prizorgas la infanojn. La kazuaroj loĝas en la pluvbaroj, plejparte en la ŝtato Kvinslando.



Dromiceo

La dromiceo troveblas nur en Aŭstralio mem. Ĝi altas 1,6-1,9 metrojn. Preskaŭ unike, la patro kovas la ovojn kaj prizorgas la nove naskitajn bebojn ĝis ilia adoltiĝo. Dromiceoj loĝas en ĉiu parto de la aŭstralia kontinento. La bildo de dromiceo estas parto de la nacia emblemo de Aŭstralio:



Humuro

MISTRAFO

Nekonata aŭtoro

El la portugala tradukis Tamiris Assunção

Alveninte hotelon, vojaĝinto eksciis, ke estas je lia dispono komputilo konektebla al Interreto. Do li tuj rapidis sendi retmesaĝon al sia edzino. Tamen li mistrafis klavon, kaj sendis la mesaĝon al alia homo, anstataŭ al sia edzino.

Sed kiu ricevis lian mesaĝon, estis vidvino, kiu ĵus revenis el la entombiĝa ceremonio de sia edzo. Apenaŭ ŝi legis la mesaĝon, ŝi svenis. Alveninte hejmen, ŝia filo ekvidis ŝin falintan apud la komputilo, sur kies ekrano legeblis la jeno:

“Kara edzino:

Mi alvenis bonfarte. Certe vi surpriziĝas, ke mi sendas mesaĝon al vi per elektronika poŝto. Monriĝis, ke tie ĉi estas komputilo, per kiu oni povas sendi mesaĝojn al siaj karaj homoj. Mi ĵus alvenis, kaj certiĝis, ke ĉio jam estas preta, por akcepti vin en la venonta vendredo. Mi ege volas revidi vin, kaj mi esperas, ke via vojaĝo estos tiel trankvila, kia la mia.”

[Represita el *Inko* marto-aprilo 2012]

Foto



Indiĝena aŭstralia platdorsa testudo

Rakonteto

La lakto

de Herta Müller¹ (tr. Júlia 'Sigmond)



Herta Müller

Kiam Amalie estis sepjara, Rudi kondukis ŝin tra la maizkampoj. Li trenis ŝin ĝis la ĝardenfino. „La maizkampoj estas la arbaro” – li diris. Poste li kunportis ŝin al la garbejoj: „La garbejoj estas la kastelo.”

Malplena vinbarelo staris en la garbejoj. Ili ŝoviĝis en ĝin. „La barelo estas la lito” — diris Rudi. Li ornamis la hararon de Amalie per sekaj lapoj. „Ĉi tiu estas cia dorna krono” – li diris. „Ĉi damniĝis. Mi amas cin. Sed ci devos suferi.”

La poŝoj de Rudi plenis de vitrosplitoj. Li metis ilin sur la borderaĵon de la barelo. Tiuj eklumineskis. Amalie kaŭris ĉe la fundo de la barelo. Rudi genuiĝis antaŭ ŝi. Li suprenfaldis ŝian veston. „Mi elsuĉos cian lakton” – li diris. Rudi buŝkaptis la mampintojn de Amalie. Ŝi fermis siajn okulojn. Li ekmordis la etajn, brunajn cicojn.

La mampintoj de Amalie ekŝvelis. Ŝi ekploris. Rudi tra la ĝardenfino forfuĝis al la kamparo. Amalie kuris en la domon.

La eroj alĝuiĝis al ŝia hararo. Ĝi entute hirtiĝis. La edzino de Windisch detranĉis la hirtaĵojn. Ŝi kompresis la mampintojn de Amalie per kamomiloteo. „Neniam plu ci povos ludi kun li” – ŝi diris. „La filo de tiu remburisto freneziĝis. Lia kapo iĝis malplena pro la pajloŝtopitaj bestoj.”

LA ORIOLO

Tra la aperturo de la rulkurteno ekkrevadis la mallumo. Amalie febrigiĝis. Windisch ne povis fermi siajn okulojn. Li pensis pri la disŝiritaj cicoj.

La edzino de Windisch kaŭris ĉe la rando de la lito. „Mi sonĝis, ke mi surgrimpis al la subtegmento. Mi tenis kribrilon enmane. Sur la eskalo mi trovis mortintan birdon. Oriolon. Mi levis ĝin per ĝiaj piedoj. Sub ĝi tumultis grandaj, nigraj muŝoj. Ili eksvarmis. Ili kovris la fundon de la kribrilo. Mi skuis ĝin, sed la muŝoj ne forflugis. Tiam mi malfermis la klapon de la subtegmento. Mi forkuris en la korton. La muŝplenan kribrilon mi ĵetis en la neĝon.”

LA ĜEMEL-BUTONOJ DE ĈEMIZMANIKO

Rudi estis la sola germana laboristo en la vitrofabriko. „Li estas la sola germano en ĉi tiu regiono” – diris la peltisto. Komence la rumanoj miris, ke post Hitler ili renkontiĝas kun vivanta germano. Ĉiam nur la germanoj – diris

¹ Nobelpremiito literaturan en 2009

la sekretariino -, ĉiam nur la germanoj. Eĉ en Rumanio.”

„Ankaŭ tio havas sian avantaĝon” – pensis la peltisto. “Rudi gajnas bone. Li havas bonan rilaton kun iu ulo de la Sekuritato (sekreta polico). Tiu ulo estas alta, blonda viro, kun bluaj okuloj. Li aspektas kvazaŭ germano. Rudi opinias, ke li estas tre erudita. Li konas ĉiuspecajn vitrojn. Rudi donacis al li kravato-pinglon kaj paron da ĝemel-butonoj por ĉemiz-manikoj. Nature ĉiuj el vitro. Sed meritis – diris la peltisto -, sen li eĉ nun ni ne havus la pasporton.”

Rudi donacis al tiu bubo ĉiujn vitraĵojn de la loĝejo. Vazojn por floroj. Kombilojn. Bluan lulseĝon. Telerojn kaj tasojn. Bildojn, noktolampon kun ruĝa ŝirmilo, same el vitro faritajn.

La vitrajn orelojn, lipojn, okulojn, fingrojn kaj piedfingrojn, Rudi hejmenportis en valizego. Li metis ilin surplanken. La koloraj vitraĵoj longvice kurbiĝis antaŭ li. Longe li rigardadis ilin.



Spongoĝardeno en la marparko Jurien Bay, Okcidenta Aŭstralio

La Mirmekobo



Kiel besto, la Mirmekobo (*Myrmecobius fasciatus*) estas preskaŭ elmortinta en sia indiĝena teritorio. Sed en sia revua formo, ĝi estas internacie havebla senpage, kaj ni esperas ke vi enhejmigos ĝin, nutros ĝin per viaj legado kaj kontribuo de enhavo, kaj ĝuados ĝin.

Adreso por ĉiuj komunikaĵoj, por peti ekzempleron aŭ por peti abonon, kaj por sendi kontribuojn: donbroadribb@mirmekobo.com

Abono al la revuo estas senpage. Ĉar neniuj surpapere presitaj ekzempleroj ekzistas, neniu preskosto ekzistas. Se vi deziras mem per via komputila presilo presi ekzemplero(j)n, por vi mem aŭ por aliaj, tion vi rajtas fari laŭdezire kaj senpage.

La revueto Mirmekobo estas sendependa, kaj subtenas neniun ismon. Artikolojn povas kontribui iu ajn. Tre bonvenaj estas literaturaĵoj: noveloj, poemoj, prozaĵoj iaspekaj; esprimoj de vidpunkto; historiaĵoj; prezento de interesaj hobiaĵoj; biografiaĵoj, aŭtobiografiaĵoj; legendoj, mitoj... Bildoj, ĉu fotoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu klarigaj, tre bonvenos. Reklamojn, anonc(et)ojn, propagandon, lingvajn studojn aŭ kritikojn, pornaĵojn, Mirmekobo malakceptas. La redaktoro rajtas akcepti, modifi, aŭ malakcepti ian kontribuojn, kiun li opinias malkonforma al la karaktero kaj reputacio de la revueto. Korektojn evidente bezonajn li rajtas fari, konsultinte la verkinton.

© kopirajto apartenas al la verkinto de kontribuoj.

Represo de kontribuoj estas permesata, se permeson konfirmas ĝia verkinto. Malnovaj numeroj de *Mirmekobo* troviĝas ĉe www.gazetejo.org/mirmekobo kaj ankaŭ ĉe la retejo de la redakcio: mirmekobo.com

Redaktoro: Donald Broadribb